

B.K. 2011 Teatraĵo – honora mencio  
João José Mendes Quiterno dos Santos -  
Portugaliao

# **Aŭtodafeo**

**triakta  
tragedikomedio**

“Ekzistas io minaca  
en longedaŭra silentado.”

**Sofoklo**  
helena tragediisto  
496aK-406aK



### **Al aktoroj kaj reĝisoroj**

*Petu permeson al la aŭtoro de ĉi tiu dramo por surscenigi ĝin. La aŭtoro kunlaboros por faciligi la surscenigadon de la dramo. Tiu kunlaboro okazos per speciala rabato en la aĉeto de la libroj, per surscenigaj kaj dramaj sugestoj kaj ĝenerale per konsiloj por fari la ponton inter la dramo kaj la teatraĵo, se necese. Pro la kosto de la vojaĝoj, eble la aŭtoro ne povos ĉeesti la teatraĵojn, sed eblas komuniki per interreta sistemo. La aŭtoro antaŭvidas la publikigadon de sinsekvaj fotoj de teatraĵo, en dua eldono de ĉi tiu verko. Cele al tio, prenu altkvalitajn fotojn pri la rolado.*

# Aŭtodafeo

(triakta tragedikomedio)

## Scenaj indikoj

*Sur la scenejo lokiĝas kvar malsamaj skribotabloj formante preskaŭ duoncirklon. Sur ĉiu tablo videblas komputilo, ĉe kiu sidas homo, kiu interŝanĝas retmesaĝojn. La kvar roluloj frontas al la spektantaro, tiel ke oni povu facile vidi iliajn vizaĝesprimojn. La komputiloj ne kaŝu la vizaĝojn. Tiuj kvar homoj apartenas al la sama diskutgrupo: La Religiuloj.*

*Ĉiu skribotablo enestas en spaco, kiu klare montras, ke ĉiu grupano troviĝas en sia hejmo. Iom da sceneja laboro montras la karakteron de ĉiu homo per la dekoracio de ties hejmo (vidu sekvan paĝon).*

*La lumo estu abunda, tiel ke oni klare spektu la movojn kaj vizaĝesprimojn de la roluloj. Forta lumo incidas sur la rolanta ulo, kaj iom malpli forta sur la aliaj.*

*Kiam ĉiu rolulo skribas mesaĝon, kiu vidiĝas en grandaj literoj super lia kapo, li samtempe parolas. Tiam aŭdiĝas la muziko elektita por tiu rolulo (vidu sekvan paĝon). En la teksto aperas kelkaj frazoj en la portugala kaj en la latina. Tiam oni devas diri ilin en tiuj lingvoj, sed la skribaĵo devas aperi en esperanto super la kapo de la intervenanto. Lertaj reĝisoroj adaptu la portugalajn frazojn al la denaska lingvo de la spektantaro. Se ĝi estas internacia, restigu la portugalan.*

*La ritmo de la rolado estas malrapida, tamen ne tiel malrapida, ke la spektantaro oscedu.*

## **Roluloj**

### **Pekulo**

Liberpensulo juĝata de la religiuloj.

Simpla skribejo, multaj libroj pri diversaj temoj, bela ina foto el la revuo *Playboy*, *Penthouse* aŭ simile.

Muziko: Betoveno - "Für Elize".

<http://www.youtube.com/watch?v=o0VwTw1eZ1k>

### **Ĉefo**

Inkviziciano rigore juĝanta Pekulon.

Lia hejmo ŝajnas altaro de Inkvizicio. Granda kristokruco, malhelaj koloroj, terura etoso.

Muziko: Mozarto - "Rekviemo".

[http://www.youtube.com/watch?v=Zi8vJ\\_IMxQI](http://www.youtube.com/watch?v=Zi8vJ_IMxQI)

### **Fidulino**

Fraŭlino tre mistika, kiu tre timas la Diablon, kiun ŝi nomas Kornulo.

Fraŭlina simpla ĉambro iom mistika, rozkolora, kie incenso fumas.

Muziko: Enigma - "Mea culpa".

<http://www.youtube.com/watch?v=X2-VdxHaunw&playnext=1&list=PL10F33A1DC55CA936&index=2>

### **Krokodilo**

Esperanto-komencanto de antaŭ 30 jaroj.

Skribejo kie vidiĝas dek libroj kun la sama titolo: *Kurso de Esperanto en 30 Jaroj kaj 5 Tagoj*.

Muziko: Oraj kantoj - "Krokodilo".

<http://www.youtube.com/watch?v=Xhze2dne7Pk>

## Akto 1

*(Kiam la kurteno leviĝas, ĉiuj roluloj interŝanĝas retmesaĝojn. La lumo havas la saman intensecon sur ĉiu el ili. Dum la ludado, la lumfortiĝo sur unu el la roluloj indikas al la spektanto, ke tiu rolulo parolas aŭ iel intervenas.)*

### Pekulo

Karaj amikoj:

Ĉu iu el vi povas helpi min pri konstruado de retejo por nia grupo "La Religiuloj"?

### Ĉefo

Saluton, Pekulo:

Kiomfoje mi devas diri al vi por ne paroli en esperanto? Ne ĉiuj esperantistoj parolas esperanton (*li diras tion serioze, kvankam la paradokso ridigas la atentan spektanton, espereble*). Vi devas respekti tiujn homojn kaj ankaŭ la regularon de ĉi tiu diskutgrupo. Laŭ nia regularo, esperanto estu uzata nur kiam ĉiuj ni parolos ĝin.

### Pekulo

Saluton, Ĉefo!

Tamen, se ni ne rajtas paroli en esperanto, ni neniam ekhavos la necesan praktikon ĝin paroli.

### Ĉefo

Pekulo, en nia grupo estas jam malnovaj kaj maljunaj esperantistoj, kiuj jam donis multon al la movado. Unu el ili eĉ fondis nian diskutgrupon. Nia samideano Krokodilo estas esperantisto de antaŭ 30 jaroj. Do, respektu, ke li ankoraŭ

ne scipovas esperanton.

**Pekulo**

Ĉefo, mi havas dubon, kaj eble vi povas solvi ĝin.

**Ĉefo**

Pekulo, mi dubas, ke vi havas dubon, sed diru.

**Pekulo**

Se esperanto estas lingvo pli facila ol la aliaj, kial tiuj homoj ankoraŭ ne lernis ĝin?

**Ĉefo**

Mi sciis, ke via dubo estas provoko, Pekulo. Ĉu vi dubas, ke esperanto estas la lingvo plej facile lernebla, kaj ke tial ĝi estas la taŭga solvo por la internacia komunikado?

**Pekulo**

Vi respondas al mia demando per akuzo, ke mi provokas vin, kaj poste vi respondas per demando. Sed mi respondas al vi. Mi ne dubas, ke esperanto estas facile lernebla. Mi ne dubas, ke esperanto estas la plej taŭga komunikilo inter la popoloj. Ĝuste pro tio, mi nur ne komprenas, kial tiuj homoj ankoraŭ ne lernis esperanton.

**Ĉefo**

Vi akaparas la tutan diskuton. (*Kriante.*) SUFIĈAS!



## Pekulo

Ĉefo, vi scias, ke majuskligo de teksto signifas krimon, en la reto. Krioj ne montras edukitecon. (*Ironie.*) Trankviliĝu, ho flugema disĉiplo de Ramatiso<sup>1</sup>!

## Ĉefo

(*Kriante.*) SUFIĈAS! Vi ne rajtas skoldi esperanto-veteranojn per viaj incitaj demandoj. Pri la nobla spirito de Ramatiso, vi eĉ ne pepu, ĉar vi nenion komprenas pri tiu spirita majstro de la homaro.

## Pekulo

Kiuj veteranoj, Ĉefo? Kiuj esperantistoj? Se ili ne parolas esperanton, do ili ne estas esperantistoj, kaj tiel ili neniam veteraniĝis pri esperantisteco, kiun ili do entute ne havas.

Pri via spirita majstro Ramatiso. Jen ekzemplo de pseŭdo-saĝulo, kiu lanĉas konfuzojn, miksas doktrinojn kaj ne kapablas pruvi plejparton de siaj asertoj.

## Ĉefo

(*Laŭ la kresko de la kolero de Ĉefo, intensiĝas Rekviemo de Mozarto minacante danĝeron. Sur tiu muzika fono, latine kaj iom kantante, Ĉefo lante kaj mistike krucosignas dum eldiras la latinaĵon.*)

"In nomine patris et filii et spiritus sancti."

(*"En nomo de la patro, de la filo kaj de la sankta spirito."* aperas supre esperante skribite, sed la kanteto estas nur en la latina. La skribo de la traduko estas maniero sciigi la

---

<sup>1</sup> Portugale "Ramatis". Spirito, kiu skribis multajn librojn per kelkaj medioj. La spiritistoj, kiuj baziĝas sur la verkoj de Allan Kardec, opinias, ke Ramatis estas pseŭdosaĝa spirito, do ne kredinda. La homoj, kiuj ne interesiĝas pri spiritistaj aferoj, preteratentu ĉi tiajn aludojn.

---

*spektanton pri la kantitaĵo, ĉar plejofte la homoj ne konas la latinan.)*

## Ĉiuj escepte de Pekulo

(*Laŭte kaj lante*) "A...men...!"

### Pekulo

Hooo... jen la gurdado! Kaj kiel vi fidelece regurdadas! Ni ĉiuj estas religiuloj. Sed la religiuloj jam lacigas min pro la fanatikeco, kaj ankaŭ pro la mezepokeskaj kondutoj. Eble mi aniĝos al grupo de ateistoj. En multaj aspektoj, ili estas multe pli religiaj ol kelkaj religiuloj. Krome, ili havas la avantaĝon ne kanteti mezepokajn diablaĵojn.

### Ĉefo

(*Defieme kaj arogante.*) Ĉu iel kaj ial vi kontraŭas niajn sanktajn kantetojn per latinaj frazoj?

### Pekulo

(*Iom spite.*) Se la grupanoj lernus esperanton, tio estus pli taŭge ol regurdadi latinaĵojn.

### Fidulino

(*Mistike.*) Pekulo, mia frato Pekulo! Vin certe obsedas la korna malamiko de Kristo!!! Puriĝu! Puriĝu per oleo! Olepuriĝu! Atentu la Kornulon! Olepuriĝu!

### Pekulo

Ole! Ole! Ole! (*Ridaĉas.*) Vi antaŭsupozas, ke la Kornulo... ole! (*ridaĉas*) min fi-influas. Kiel vi scias, ke la Diablo ne obsedas vin mem kaj Ĉefon, la mastron de ĉi tiu diskutgrupo?

**Krokodilo**

(*Al la spektantaro.*) "Ai! Se eu percebesse alguma coisa do que eles dizem! Mas gostei da cantilena em latim. Muito bonito!"

(*Al la diskutgrupo.*) Oh Emílio! Podemos cantarolar? Agora todos!

(*Skribite en la mesaĝo: "Ho! Se mi komprenus ion pri tio, kion ili diras! Sed mi ŝatis la kanteton en la latina. Tre bele! Ho Ĉefo! Ĉu ni povas kanteti? Nun ĉiuj!"*)

**Nun ĉiuj escepte de Pekulo**

"In nomine patris et filii et spiritus sancti."

(*"En nomo de la patro, de la filo kaj de la sankta spirito."*  
*Aperas skribite, sed la kanteto estas nur en la latina.*)

**Pekulo**

(*Videble skolde.*) Krokodilo, ĉu vi ne hontas, ke vi ne parolas esperanton?

**Krokodilo**

(*Kuraĝe kaj memestime.*) Mi estas esperantisto de antaŭ 30 jaroj! Mi fondis ĉi tiun grupon! Iam eble vi estos veterano kia mi!

**Pekulo**

(*Moke.*) Nur se Alzejmero atakos min tre forte!

## Fidulino

Pekulo! Vi devus esti humila kaj bona por ĉiuj! Lernu esti bona esperantisto! Lernu la vivlecionojn de bonaj homoj, kiaj estas Krokodilo kaj Ĉefo! Faru kiel mi mem, kiu ĉiam atentis la bonajn, inteligentajn kaj saĝajn ekzemplojn de tiuj du noblaj kunuloj!

Laŭ Lia Moŝta Majstro Ramatiso (*ŝi faras strangajn mistikajn gestojn*), kaj laŭ la instruoj de Ĉefo, kiam la akso de nia planedo, la Tero, vertikaliĝos (*ŝi gestas montrante vertikaliĝon de io*), multaj aferoj ŝanĝiĝos sur la Tero. Vi pentu, Pekulo! Pentu antaŭ ol 2012! Vi!, ho animo peka!, estos prenita de la Kornulo!

## Pekulo

Saluton, Fidulino!

Vi konsilas al mi agi kiel Krokodilo, kiel Ĉefo, aŭ kiel vi mem. Tamen, Fidulino, por agi kiel Krokodilo mankas al mi krokodili. Por agi kiel Ĉefo mankas al mi ramatisi kaj ordonaĉi. Por agi kiel vi mankas al mi fanatiki.

Sed... mi demandis, ĉu iu povas helpi min konstrui la retpaĝon por nia grupo La Religiuloj. Tion mi zorgas, ne tiajn mistikaĵojn kaj mistifikaĵojn. Pri viaj spiritaj minacoj, surbaze de la pseŭdosaĝa Ramatiso, mi fajfas pri ili kaj pri li. En mia lando oni diras, ke "azenaj voĉoj ne atingas la ĉielon".

## Ĉefo

(*Ordoneme.*) Tiu afero pri la retpaĝo ne estas prioritato! Nun ni organizas aliajn aferojn en ĉi tiu diskutgrupo, kaj do ni ne povas fari tion.

## Ĉiuj escepte de Pekulo

(*Laŭte.*) "A...men...!"



### **Pekulo**

Kio prioritatas?

Ĉu Krokodilo forlasos la haŭton? Ĉu finfine li lernos esperanton? Tio ja estas prioritata!

Ĉu Fidulino lernos rezoni forlasante mistifikojn? Tio estas nepra!

Ĉu vi, Ĉefo, ekestros ĉi tiun grupon enkadre de libereco kaj demokratio? Ho! Tio estus lojala!

### **Ĉefo**

*(Laŭte, nervozeme, kolere.)* Pekulo! Via teniĝo estas unika en ĉi tiu diskutgrupo! Neniam aperis homo kia vi! Ĉi tie, vi nepre devas paroli en la portugala lingvo.

### **Pekulo**

*(Absolute.)* Neniam! En internacia esperanto-grupo, oni parolu esperanton!

*(Moke.)* Krom tio, mi jam forgesis kiel oni diras la vortojn en la portugala lingvo. ;)

### **Fidulino**

*(Krie.)* Satane!!! Pentu, animo de la malhelo! La Kornulo forlasu vin, Pekulo! La Tero vertikaligos sian akson en 2012! Tiam ĉiuj bedaŭros homojn tiajn, kia estas vi! Atentu! Pentu! Pekulo, mi timas, ke la Kornulo jam prenis vin!

### **Pekulo**

*(Ridante.)* Kial la Kornulo forlasu min? Ĉu vi volas lin por akompani vin? Kiam la Tero vertikaligos sian akson, ĉu vi volas, ke la Kornulo vertikaligu ion sian por vi?





### Fidulino

*(Krie kaj mistike gestante.)* Sakrilegie!!! Sakrilegie!!! Sakrilegie!!!

### Pekulo

*(Nun serioze kaj grave.)* La Diablo ne ekzistas, fraŭlino! Sed se li ekzistus, certe li inspirus homojn al krokodilado, kaj ankaŭ al malrezonaj mistifikaĵoj. Ho! Se via Kornulo ekzistus, li certe inspirus la cenzurajn pensojn, kiuj estas la rifuĝejo de la kovarduloj! Ja cenzuro estas la plej ŝatata metodo de la malamikoj de l' demokratio kaj de l' libereco.

### Ĉefo

*(Aŭfekte pastreske. Lante.)* Pekulo! Respektu la plej aĝajn esperantistojn, kaj obeu la regulojn de la grupo! En ĉi tiu esperanto-grupo, oni parolas la portugalan lingvon, ĉar multaj el la esperantistoj de ĉi tiu grupo ne parolas esperanton. Ni ne faros la retpaĝon, ĉar ni devas ankoraŭ organizi nin. Krome, ne ofendu la aliajn homojn kaj Lian Sanktecan Moŝton "Swami Sri RAMA-TYS". *(Li diras la nomon de sia spirita gurunio, freneze tromalfermante la okulojn kaj rektigante la dorson sur la sidloko.)*

### Pekulo

*(Ridante kaj falsvoĉe.)* "In nomine..." Vi estas tre ŝercaj! Ha! Ha! Ha! Tiu aludo al la Kornulo tre amuzis min! *(Plu ridas.)* Kiel vi scias la tutan nomon de via spirita majstro? Konfesu, ke vi kaŝe prenis lian identigilon, kaj tie vi gvtatis lian tutan nomon... *(Ridante.)* Ĉu!?

### Fidulino

*(Preĝe.)* Dio mia! Spirito de Via Moŝta Ramatiso! Pardonu la moralan ĥaoson de Pekulo! Helpu lin liberiĝi el tiaj

obsedaj ideoj! La Kornulo forlasu lin!

**Pekulo**

(*Ridante.*) Fidulino, vi tiom aludas al la Kornulo, ke iam li vizitos vin, enmetiĝos en vian liton, kaj tre varmete vi dormos tiun nokton!

(*Aŭdiĝas forta tondro. La scenejo tute malheliĝas. Post kvin sekundoj aŭdiĝas dua tondro, lumiĝas ruĝe la loko de Ĉeĥo, kiu tiam aperas kun diabla vizaĝo, kie ne mankas la kornoj sur la kapo. Li faras strangajn gestojn kvazaŭ sorĉisto. Post pliaj kvin sekundoj, aŭdiĝas tria tondro, kaj aperas altaj flamoj en la tuta scenejo, kvazaŭ tio estus apokalipsa incendio.*)

(*Falas la kurteno kaj tuj ekleviĝas.*)

## Akto 2

*(Oni ŝajnigu, ke la tempo pasas. Pasas tagoj. La tempopaso povas esti montrata per tagiĝo kaj noktiĝo farataj de lumoj, dum en granda horloĝo sufiĉe rapide cirkulas la montriloj de la horoj kaj de la minutoj. Ĉiuj aperas sammaniere sur la scenejo. Ĉiu ĉe la skribotablo. La fono malantaŭ Pekulo montras, ke li jam skribis kelkajn mesaĝojn sen respondo. La aliaj tri amuziĝas interŝanĝante mesaĝojn. Pekulo legas tiujn mesaĝojn, kaj respondas al ili, sed liaj mesaĝoj nur aperas ĉe la komputilo de Ĉefo.)*

### Pekulo

*(Naive li pensas. Li parolas al la publiko.)* Certe ili laciĝis je mi. Eble ili interkonsentis lasi min paroli ĝis laciĝo. Iel ajn, ili legos, kion mi intencas diri al ili. *(Li pluskribas al la grupo, senresponde.)*

### Pekulo

*(Skribas al la grupo.)*

Ĉefo kaj aliaj!

Mi jam konstruis la retpaĝon, do neniu el vi bezonos malŝpari tempon por tio.

### Pekulo

*(Insiste plu skribas al la grupo.)*

Estimataj kungrupanoj!

Mi jam konstruis nian retpaĝon. Ne zorgu do pri la afero.

## Pekulo

*(Li enpenŝiĝas. Li parolas al la publiko.)* Hmmm! Ĉi tio estas stranga... Tro da silento! Jam diradis la granda Sofoklo, tre admirata de ĉi tiu dramverkisto: "Ekzistas io minaca en longedaŭra silentado."

Mi vidas iliajn mesaĝojn, sed neniu el ili reagis al la miaj... Mi tuj iras al la grupopaĝo por vidi, ĉu miaj lastaj mesaĝoj tie kuŝas.

*(Li ŝrumpas la mesaĝlegilon Tunderbirdon kaj malfermas la krosilon Fajrfokson. Li iras al la grupopaĝo, serĉas siajn lastajn mesaĝojn, silente fluglegas kaj ekkoleras.)*

## Pekulo

*(Li ekkrias.)* Hoooo! Jen la cenzuro! Jen la cenzuro! Jen la cenzuro! Ĉefo senaverte cenzuris min!, barante miajn mesaĝojn! Li malpermesas, ke miaj mesaĝoj atingu la aliajn membrojn de la diskutgrupo! Li cenzuras miajn mesaĝojn! Tio tute ne estas demokratia! Tio estas faŝisma ago!

## Pekulo al Ĉefo

Saluton, Ĉefo!

Via teniĝo senaverte cenzuri miajn mesaĝojn estas maldemokratia ago, kiu memorigas la homojn pri la inkviziciaj tempoj.

Grandskale Ĉinio, Nordkoreio kaj Irano tiel agas. Do, via konduto pli similas al tia konduto de la diktatoroj de tiuj landoj, ol al konduto de homo vivanta en demokratia socio. Respektema kaj lojala homo donas la rajton al la aliaj paroli kaj elmontri siajn vidpunktojn.

Mi esperas, ke vi komprenu mian plendon kaj restarigu la juston.

Salutas vin

Pekulo

## Ĉefo al Pekulo

*(Afekte pastreske.)* Pekulo, mia frato Pekulo!

Pro la respekto ŝuldenda al bonaj kaj veteranaj esperantistoj, kiuj ne scipovas esperanton, kaj pro tio, ke vi volas pritrakti aferojn eksterajn al la intereso de la grupo, kiel la starigo de retpaĝo por ĝi, viaj mesaĝoj estas malpermesataj.

*(Laŭte, lante kaj religi-miene.)* Pekulo! Ho frato amata! Vi ja bezonas spiritan puriĝon! La fajro ĉion purigas, mia frato! Ho jes! La fajro! Lumo tra la epokoj! Solvo por la impertinentuloj! La universaj leĝoj montrus al vi, ke necesas morti por reviviĝi! Ĝoju do! Vi-animo bezonas esti kisata de la flamoj... por renoviĝo! Ni, la plenumantoj de la universa juĝado, *(pli laŭte)* ne povas plu permesi, ke vi uzu vian liberon laŭ via bontrovo! Kio estus la mondo sen tiuj, kia estas mi, kiuj havas la pezan laboron juĝi, puni kaj malpermesi!? *(Plu afekte.)* Lernu, ho ribelema spirito!, ke libero estas obeo al la intereso de la ĉefoj, *(falsdolĉe)* kiuj garantias la pacon kaj la universan ekvilibron.

*(Aŭdiĝas diable terura ridego de Ĉefo.)* HA! HA! HA!

Ĉefo.

*(La vizaĝesprimo de Ĉefo ektransformiĝas al diabla vizaĝo. Laŭtiĝas Rekviemo.)*

*(Falas la kurteno kaj tuj ekleviĝas.)*

### Akto 3

#### Pekulo

*(Skribas individue al ĉiu elemento de la grupo.)*

Karaj kungrupanoj:

Por silentigi min, Ĉefo filtras miajn mesaĝojn, tiel cenzurante mian liberon. Tiu ago estas maldemokratia kaj nur vidiĝas nuntempe en landoj kiel Ĉinio, Irano kaj Nordkoreio. Mi esperas, ke vi ĉiuj havu sencon pri justeco kaj demokratio.

Salutas vin

Pekulo.

*(Ĉiuj membroj de la grupo interŝanĝas mesaĝojn inter si. La mesaĝo de Pekulo aperas en iliaj komputiloj. Ili legas ĝin, sed preteratente.)*

#### Fidulino

Kara Pekulo:

Nia gvidanto Ĉefo nur volas vian bonon. Liaj agoj estas ĉiam bonintencaj, kaj vi devas penti pri viaj faritaĵoj. Ĉefo kompetente konas dekdu lingvojn kaj flue parolas ses el ili. Li estas submajstro de Ramatiso. Vidu kiel tiu klera homo estas supera, ke li parolas sian denaskan lingvon en nia diskutgrupo por ne ofendi nian fraton Krokodilo! Ekde kiam viaj mesaĝoj ne aperas en nia diskutgrupo, ĉiuj ni libere parolas en la portugala lingvo, ĉar ni estas bonaj esperantistoj.

Pekulo, mia frato! Ja la vertikaliĝo de la Tero ne estas amuzo. Ne volu, ke la Kornulo prenu vin! Ne ofendu nian spiritan majstron, la Moŝtan Ramatison (*ŝi gestas mistike*).

Mistike brakumas vin



Fidulino

**Pekulo**

Kara Fidulino:

Mi estu tre klara. Se vi kaj Ĉefo estus elektataj por iri en la Paradizon, mi petus, ke mi brulu en la Infero.

Sen iu ajn intenco brakumi vin

Pekulo

**Krokodilo**

Caro Pêkulô! (*Li diras "Pekulo" kun fermitaj "e" kaj "o" pro influo de la portugala lingvo.*)

(Entuziasme.) Já comprei mais um livro *Kurso de Esperanto en 30 Jaroj kaj 5 Tagoj*. Já só faltam 5 dias. Então poderemos falar todos em esperanto, porque o esperanto é muito fácil!

(*Li agitas esperantan flagon. Per aĉa prononco.*) Esperanto estas facila lingvo!

(*Super la kapo de Krokodilo aperas skribite en esperanto: "Kara Pekulo! Mi jam aĉetis plusan libron Kurso de Esperanto en 30 Jaroj kaj 5 Tagoj. Nur mankas 5 tagoj. Tiam ni ĉiuj povos paroli en esperanto, ĉar esperanto estas tre facila. Esperanto estas facila lingvo!"*)

**Pekulo**

Kara Krokodilo:

Ĉu vi scias, kion Jesuo diris al Nikodemo? "Estas necese, ke vi renaskiĝu." Tiam, en la proksima reenkarriĝo, eble vi kapablos paroli en esperanto.

## Krokodilo

Amigo, fale em português! Assim, não entendo nada! (*Super la kapo de Krokodilo aperas skribite en esperanto: "Amiko, parolu en la portugala! Tiel mi komprenas nenion!"*)

## Ĉefo al Pekulo

Estimata frato ĉe Jesuo Kristo!

La paco de la Kristo kaj de Lia Servanto Ramatiso estu kun vi!

Vi, mia kara frato, ofendis ĉiujn nin, per viaj provokoj devigi ĉiujn esperantistojn paroli esperanton, kaj pro via insistado voli, ke la grupo havu retpaŝon. La planoj de la majstroj estas aliaj, sed vi ne komprenas tion.

*(Pastromiene, lante kaj afekte.)* Sciu, mia frato, ke kelkfoje morti estas vivi! *(Pli laŭte, prelege.)* Kio do plej viviga ol la fajro!? Vi foriĝos el nia diskutgrupo... kaj tiel mi savos vin de danĝeraj ideoj, kia estas liberpensado, ĝenerala libereco, demokratio, esperantismo kaj multaj aliaj ideoj, kiuj pereigas vian animon... Post bruliĝo, mia filo, vi povos finfine prezentiĝi antaŭ nia Kristo. Tiam, mia frato, vi komprenos la funkcion de tiuj, kiuj aplikas blinde, rigore, ĝuste kaj pedante... la leĝon.

*(Iom post iom, la tuta scenejo ekaspektas simila al bruliga inkvizicia aŭtodafeo. Ĉiuj, escepte de Pekulo, murmuris Rekviemon de Mozarto kaj stariĝas ĉe sia skribotablo, havante grandan flamiĝantan torĉon en mano. Ĉiuj religi-lante leviĝas de la sidlokoj kaj paŝas al Pekulo. Tiam ĉiu el ili ĵetas sian torĉon ĉe Pekulon, kaj lia loko tuj flame kaj fantaste incendiigis. La flamoj altas ĉe Pekulo, dum la aliaj religi-lante distiĝas de li kaj plu murmurante revenas al siaj skribotabloj. Tiam, ĉirkaŭita de la flamoj kaj malfacile spiranta, jam tusanta, Pekulo skribas.)*



**Pekulo**

*(Kriante kuraĝe kaj forte sed aflikte. Kiam li diras "vi", li rigide kaj energie fingromontras la spektantaron.)*

**K I A L ?**

**Kial la esperantistoj ne parolas esperanton?**

**Kial vi timas la liberon?**

**Kial vi ne akceptas la diferencon?**

*(La flamoj plu detruas ĉion ĉe Pekulo, dum la aliaj homoj trankvile kaj senĝene babilas en la portugala, ne aŭdante lin. Plu sonas laŭte Rekvieto. Sur la komputilo de Pekulo aperas en grandaj ruĝaj literoj, kiuj estas legataj de diabla voĉo:)*

**VI MORTIS EN ĈI TIU ESPERANTA DISKUTGRUPO  
PRO VIA MANIO PAROLI EN ESPERANTO**

**VI MORTIS EN ĈI TIU RELIGIA KOMUNUMO  
PRO VIA AMO AL L' LIBERECO**

**LA FLAMOJ PURIGAS NUN VIAN ANIMON  
DANKE AL LA KARITATEMA AGO DE  
LA NOVA INKVIZICIO**

*(Pekulo plu brulas stare ĉe sia komputilo, sin skuanta pro la flamoj, kiel martiro. Tio okazas ĝis la fino, intense, dum laŭte plu sonas Rekvieto.)*

**Ĉiuj, escepte de Pekulo, tre laŭte kantas:**

"In nomine Dei! In nomine Dei! In nomine Dei!

In nomine Dei! In nomine Dei! In nomine Dei!

In nomine Dei! In nomine Dei! In nomine Dei!"

*(Aperas skribite en esperanto:*

*"En nomo de Dio! En nomo de Dio!" En nomo de Dio!")*

*(Falas la kurteno.)*

**FINO**